N. N. 57,

# Fratoj, al festeno bona Dio

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

1. Fratoj, al festeno bona Dio
Kunvenigis nin en kanta ĥor',
Ĉiun zorgon tuj per energio
Ni kuntrinkantuloj ĉasu for!
|: Kie ŝaŭmas vin', val-le-ral-la!
Ĝoj' florigas nin, val-le-ral-la!
Kiel de l' printemp bela flor'.:|

2. Gaje ni traĝoju la junecon
Kun amikoj bonaj en kunven',
Ili donu al ni kontentecon,
Kaj la vino estu kora ben'!
|: Per vinbara fort', val-le-ral-la!
Kontraŭ iu sort', val-le-ral-la!
Ni jen armigitaj de deven':|

3. Ne trinketu nur el la pokalo,
Kiam plena estas la barel',
Kiu ĝuas vivon gute en tervalo,
Ne konscias pri vivada cel'!
|: Vigle trinku do! val-le-ral-la!
Malplenigu, ho! val-le-ral-la!
Plua pleno kuŝas en la kel'!:|

4. Kun lumanta sento la junulo
Bonkuraĝe vagas tra vivad',
Kaj kun amikeco de kunulo
Li turnadas laŭ destina rad'.
|: Vi do fidu min! val-le-ral-la!
Ĝis de l' mondo fin', val-le-ral-la!
Estos mi fidela kamarad':|

5. Ne sen uz' pasigu la junecon,
El pokalo, laŭ konata fam',
Vi elĉerpos veran la belecon:
Ĉe knabina brusto kora am'!
|: Kiam lasos nin, val-le-ral-la!
La junec' kaj vin', val-le-ral-la!
Nin akceptu, Ĥaron, via pram':|

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Brüder, zu den festlichen Gelagen" de N. N. 57 en Esperanton de* Ludwig Emil Meier *(∗1847-02-16 – †1919).*

*Arg-833-1673 (2013-02-20 17:33:26)*

*Tradukita de Ludwig Emil Meier (16.02.1847 - 1919 ). Tiu ĉi traduko aperis en 1907 en la kant-libro „Esperantista Kantaro", eldonita de la Esperanta Eldonejo Hans Theodor Hoffmann en Berlino. Pri la tradukinto Ludwig Emil Meier rigardu la vikipedian retejon* http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier.